

Franz Grillparzer 

# La Monahejo êe Sendomir'



Irene Triesch en Gerhard Hauptmann-a dramo „Elga“.

Stuttgart.  
Franckh'sche Verlagshandlung.

~~B. 25~~  
46

La Monahejo ĉe Sendomir'.

---



841.112.2(436)-3-922

# La Monaĥejo ĉe Sendomir'

(Modelo por la  
Gerhard Hauptmann-a dramo  
„Elga“).

El la verkoj de Franz Grillparzer

tradukita de

L. E. Meier.



Stuttgart.  
Franckh'sche Verlagshandlung  
W. Keller & Co.

## Antaŭparolo.

---

El la malmultaj noveloj de la fama aŭstra dramverkisto Grillparzer' ni elektis ĉi tiun, ĉar ĝi meritas apartan intereson, ne nur en Germanujo, sed ankaŭ en eksterlando, per la dramo „Elga“ de la bonkonata dramverkisto G. Hauptmann. Tiu ĉi dramo traktas la okazintaĵojn de nia novelo.

Eldonante la Esperantan tradukon ni aparte dankas al la konata aktorino, Irene' Triesch', por ŝia afabla permeso, meti ŝian portreton, prezentanta „Elga'n, sur la kovrilon de la libreto.

**La eldonistoj.**



## La Monaĥejo ĉe Sendomir'.

(Laŭ okazintaĵo tradiciita kiel vera).

La radioj de la malleviĝanta suno orumis la deklivojn de unu el la plej ĉarmaj valoj de la vojevoda distrikto Sendomir'. Kvazaŭ donante adiaŭan kison ili ripozis sur la muregoj de la monaĥejo, kiu ĉe ĝia orienta flanko paradis kun multego da fenestroj kaj komfortpromesa vidaĵo, kiam du rajdantoj, akompanite de malmulte da servistoj, ĵus atingis la limon de la kontraŭa montetaro kaj, admonite per la vespera sonorilo, post mallonga rigarda restado plirapidante la troton de siaj ĉevaloj, enrajdis la valon por alproksimiĝi la monaĥejon.

La vestaĵoj de la malfrue alvenantaj gastoj pruvis, ke ili estas fremduloj. Largen pre-

mitaj ĉapeloj kun plumoj, alkoledaj kamizoloj premitaj per malhela brustarmaĵo, malvaste kovrantaj subvestoj kaj altaj refaldaj botoj elmontris ke ili ne estas enlandaj Poloj. Ili ankaŭ ne estis tiaj; sed, estante Germanoj kaj senditoj de la germana imperiestro ili estis vojaĝantaj al la kortego de l'militema Johann' Sobieski', kaj, surprizite de la vespero, serĉis noktripozlokon en la monaĥejo.

La jam vespere fermita pordego malfermiĝis por la alvenintoj, kaj la pordisto enirigis ilin la vastan gastoĉambron, kie ili havu refreŝaĵon kaj noktripozon; kvankam, laŭ lia senkulpiga sciigo, la abato kaj la monaĥaro, jam kunveninte en ĥorejo por vespera preĝado, devis malpermesi al si bonvenan saluton al la gastoj. La diro de la iom malkonfide rigardanta viro estis certigata per la monotona akordiĝo de duone parolantaj, duone kantantaj voĉoj, kiuj, trasonante la eĥantajn arkaĵojn el mal-laŭtiga malproksimo, sufiĉe klare pruvis la ĥorkantadon de eklezia komunumo.

La du fremduloj eniris la montritan ĉam-

bron kiu, kvankam la monaĥejo estis konstruita antaŭ nelonga tempo, tamen montris gotikajn formojn kun intencita precizeco. Malmultaj sed decaj mebloj staris apud la muroj. Tra la arkajaj fenestroj oni vidis la kamparon, kie la luno, leviĝante en oriento kaj batalante kontraŭ la resto de la vesperruĝo, ĵetis nur malmulte da brilo sur la altaĵojn de la monteta kampo, dum en la valaj fendoj kaj sub la arboj de la arbaro iom post iom nokto disvastiĝis kun ĝia malluma sekvaĵo, kaj kvieta ripozo, dolĉe intermiksante, etendis ĝian vualon super vivaĵoj kaj senvivaĵoj.

La propraj servistoj de la kavaliroj alportis vinon kaj vespermanĝaĵon. Ĉe fortike farita tablo, metita en la niĉo de la malfermita arkaja fenestro, la lacigitaj gastoj sidiĝis sur altaj apogseĝoj kaj nun ĝojiĝante pri la sorĉa ludado de la lunlumo, nun regustante vinon kaj manĝaĵon, refortigis la korpojn por la morgaŭa forvojaĝo.

Ĉirkaŭ unu horo estis tiel pasinta. Nokto jam estis malluma, sonorila sonado kaj ĥork-

antado de longtempe ĉesintaj, kaj la servistoj, forsenditaj por ripoziĝi, antaŭe estis ekbruligintaj malbrile brulantan lucernon; sed tamen la du kavaliroj ankoraŭ sidadis ĉe la fenestro fervore interparolante; eble ili parolis pri la celo de sia vojaĝo, evidente do pri io grava. Subite oni per forta fingero alfrapis la pordon, kaj antaŭ ol ili, nevolonte intermitigante la interparoladon estis respondintaj per „eniru!“ la pordo malfermiĝis, kaj eniris stranga homo, demandante, ĉu ili bezonas varmon?

La enirinto estis vestita per eluzita flikita monaĥa kostumo, kiu vere strange kontrastis la maldelikatan fortikan korpon. Kvankam li jam estis iom kurbita pro maljunaĝo kaj pli malgranda ol homa meza grandeco, tamen lia tuta esteco vidigis apartan esprimon de decideco kaj forto, tiel ke, vidante lin, oni kredus, ke li estas iu ajn alia ol pacema filo de eklezio. Liaj hararo kaj barbo, antaŭe evidente nigraj, sed nun plejmulte grize miksitaĵoj, spite ilia longo, krispaj, dense kaj riĉe ĉirkaŭis lian frunton, buŝon kaj mentonon.

Siaj okuloj, kvankam laŭ monaĥeja regulo mallevitaj, nur malofte leviĝis; sed kiam ajn ili malfermiĝis, kvazaŭ fulmo ekflamis el ili, kaj terurige briletis tiuj nigraj steloj el la cindre flavaj vangoj, tiel ke oni vere sentis plimalpremata en animo kiam la larĝaj palpebroj ilin rekovris. Tiamaniere la monaĥo, tenante paketon da lignaĵo sub brako, alpaŝis antaŭ la fremduloj demandante ĉu ili bezonas varmon?

La du kavaliroj rigardis unu la alian mirante pro la stranga aperaĵo. Dume la monaĥo genufleksis ĉe la kameno kaj komencis ekbruligi fajron kaj ne intermitigis sian faron eĉ post la sciigo, ke ili tute ne sentas malvarme kaj lia faro estas sennecesa. „La noktoj jam maldolĉiĝas“ li respondis daŭrigante sian laboron. Fininte ĝin, ĉar fajro gaje brulis, li restis starante ĉe kameno dum kelke da momentoj por varmigi siajn manojn, kaj tiam, ŝajne ne atentante la fremdulojn, alpaŝis silente la pordon.

Li jam staris ĉe tiu ĉi, tenante la anson

en mano, kiam unu el la fremduloj diris: Ĉar vi do estas tie ĉi, honorinda patro —“

„Frato!“ intermitigis la monaĥo, kvazaŭ malkontente, kaj, ne turnante sin malantaŭen, restis starante ĉe la enirejo, kun frunto klinita kontraŭ la pordo.

„Nu do, honorinda frato!“ daŭrigis la fremdulo; „ĉar vi do estas tie ĉi, informu nin pri io, kion ni deziras ekscii!“

„Demandu!“ diris, turnante sin, la monaĥo.

„Sciu do, diris la fremdulo, „ke la belega situacio kaj konstrua stilo de via monaĥejo plenigis min je admiro; sed precipe ĝia noveco, laŭ kiu ĝi ŝajnas esti konstruata antaŭ mallonga tempo!“

La nigraj okuloj de la monaĥo ĉe tiu parolo levigis kaj kun esprimo kvazaŭ furioza fikse rigardis la parolinton.

„Estas pasintaj tiuj tempoj“, daŭrigis tiu ĉi, „kiam la ekkonstruo de tiaj pruvoj de piemeco ne estis malofta! De kiom da tempo ekzistas la monaĥejo?“

„Ĉu eble vi jam scias?“ demandis la monaĥo rigardante malsupren, „aŭ, ĉu vi ne scias?“

„Ĉu mi demandus, se tion mi scius?“ respondis la fremdulo.

„Okazas kelkfoje!“ tiu murmuris. „La monaĥejo staradas de tri jaroj — tridek jaroj!“ li korektante respondis sen levo de okuloj.

„Kiu do estas la nomo de la fondinto?“ plue demandis la fremdulo. „Kiu estas tiu homo amita de Dio?“ — Nun la monaĥo mokege ekridegis. La apogilo de la seĝo, sur kiu li estis apoginta sin, krake rompiĝis per lia premo; infero ŝajnis flami en liaj okuloj kiu rigardis la fremdulojn, kaj subite turninte sin, li per forte sonanta paŝado eliris la ĉambron.

Antaŭ ol la du kavaliroj estis ankoraŭ superintaj sian miregon, la pordo denove malfermiĝis kaj la sama monaĥo reeniris. Kvazaŭ nenio estas okazinta, li alpaŝis la kamenon, disigis la fajron per disigilo, almetis lignaĵon kaj blovis la flamojn. Tiam turnante sin li



diris: „Mi estas la plej maleminenta el la servistoj de tiu ĉi domo. La plej malnoblaj servoj estas mia ofico. Mi devas esti kompletzema kontraŭ fremduloj kaj respondi kiam ili demandas. Vi do ankaŭ demandis; pri kio do?“

„Ni deziras informiĝi pri la fondo de tiu ĉi monaĥejo“, diris la pli maljuna el la du Germanoj; „sed via stranga rifuzo —“

„Jes, jes,“ diris la monaĥo, „vi estas fremduloj ne konantaj ankoraŭ la landon kaj ĝian loĝantaron. Mi, vere, tre volonte rifuzus kontentigi vian malprudentan scivolon; sed tiuokaze vi plendos ĉe la abato kaj tiu ĉi ree insultos min kiel iam, kiam mi ekprenis la palatendon de Plozk' ĉe gorgo, ĉar li estis ofendinta la nomon de miaj prapatroj. — Ĉu vi venis de Varŝava?“ li diris post mallonga paŭzo.

„Ni iros tien“, respondis unu el la fremduloj.


„Tiu estas malbona urbo!“ diris la monaĥo sidiĝante. „Ĉiu malpaco devenas de tie. Se la fondinto de tiu ĉi monaĥejo ne estus alven-

inta Varŝava-on, li ne estus fondinta monaĥejon, ne ekzistus monaĥoj tie ĉi, nek mi estus unu el ili! Ĉar vi ne venis de tie, vi kredeble estas honestaj viroj kaj, ĉion pripensante, mi rakontos al vi la historion. Sed ne intermitigu kaj ne demandu plu, kiam mi estos ĉesinta la rakonton. — Ke do ne tiom da nebulo estu nun! Oni apenaŭ duone vidas la prakastelon — kaj la luno ankaŭ lumadas malserene.“ — La lastaj vortoj perdiĝis en nekomprenebla murmuro kiu fine ĉesis, kaj nun estis profunda silento, dum kiu la monaĥo, metinte manojn en la largajn manikojn, la kapon malsupre sur brusto, sidis senmove. Jam la du kavaliroj kredis, ke li bedaŭras sian promeson kaj pro tio ili volis foriri; sed subite la monaĥo ekrektiĝis kun plifortigita ekspiro, la antaŭen falinta kapuĉo refalis malantaŭen kaj liaj okuloj, jam ne sovaĝaj, brilis preskaŭ larmeme; apogante la kapon en mano, duone turnita kontraŭ la lunlumo, li rakontis la jenon: „Starŝenski' estas la nomo de tiu viro, grafo laŭ sia gento, kies estis la vasta ĉirkaŭaĵo kaj

la loko, kie staras tiu ĉi monaĥejo. Sed tiam la monaĥejo ne ekzistis ankoraŭ. Tie ĉi oni plugadis; li mem vivadis tie supre kie nun disrompitaĵoj muregoj rebriligas la lunlumon. La grafo ne estis malbona, kvankam ankaŭ ne tute bona. Dum militiro, oni diras, li estis kuraĝa; alitempe li trankvile kaj solece vivadis en la kastelo de siaj prapatroj. La homoj plej multe miris pri unu fakto, nome ĉar oni neniam sciigis, ke li estas amanta virinan personon, sed evidente li eĉ evitis interrilaton kun virinoj. Tial oni kredis, ke li estas malamiko de virinoj; sed tamen li ne estis! Lia sento nature timema kaj — atentu ĉu mi trafos la ĝustan esprimon!“ diris la monaĥo rektigante — „ĉion superanta plaĉo pri memeco ne estis ĝis tiam permesinta al li iun alproksimiĝon. For-esto de malplezuro estis plezuro por li. — Ĉu restas ankoraŭ iom da vino? Donu al mi pokalon da ĝi! La grafo vere ne estis malbona!“

Trinkinte, la monaĥo daŭrigis: „Tiele vivadis Starŝenski' kaj tiele li pensis ankaŭ morti; sed lia destino estis alia. Imperia kon-

siliĝo forvokis lin Varŝava-on. Malkontentigite per la malsaĝeco de la popolamaso el kiu ĉiu nur volis havi sian utilon anstataŭ tiun de la komuna tuto, li iuvespere iris tra la stratoj; nigraj nuboj pendantaj je ĉielo minacis baldaŭan pluvon kaj kaŭzis kompletan mallumon. Subite li ekaŭdis post si virinan voĉon kiu tremante kaj singulte plorante alparolis lin jene: „Se vi estas homo, kompatu malfeliĉulon!“ Rapide turnante sin, la grafo vidis knabinon, kiu petante etendis la manojn al li. La mallumo de la nokto ne permesis distingi detalojn. Ŝia vestaĵo ŝajnis malriĉa; kolo kaj brakoj lumetis blanke tra nokto. La grafo sekvis la petantinon. Post dek paŝoj ŝi eniris dometon, Starŝenski' sekvis kaj baldaŭ staris kun ŝi en la malluma vestiblo. Varma, mola mano ekprenis sian. — Ĉu vi estas ordena kavaliro?“ la monaĥo intermitigis sian parolon, turnante sin kontraŭ la juna fremdulo. „Kion signifas la kruco sur via mantelo?“ — „Mi estas Maltano“, tiu ĉi respondis. — „Ĉu ankaŭ vi?“ la monaĥo demandis la alian. — „Tute Grillparzer, La Monaĥejo ĉe Sandomir'“



ne!“ respondis tiu ĉi. — „Ĉu vi havas edzinon kaj infanojn?“ — „Nek unu nek aliajn!“ — „Kiom da jaroj vi havas?“ — „Kvardek kvin.“ — „Bone, bone!“ kapbalance murmuretis la monaĥo. Tiam li daŭrigis: „Sento ĝis tiam nekonita ekokupis la grafon je l'tuŝo de la varma mano. Oni rakontas orientan fabelon pri iu, kiu subite ricevis la talenton kompreni la lingvojn de birdoj kaj aliaj naturaj estaĵoj, kaj de nun, kuŝante en ombraĵo ĉe bordo de rivereto, li kun ĝoja miro aŭdis ĉirkaŭe vortojn kaj senceojn, dum antaŭe li estis nur aŭdinta bruon kaj sonojn. Tia estis la grafo. Nova mondo estiĝis antaŭ li, kaj tremante li sekvis sian kondukantinon kiu malfermis malgrandan pordon kaj eniris kun li malaltan malmulte lumigitan ĉambrom.

„La unua radio de la lumo trafis la knabinon. Starŝenski' plej interne ekĝojegis, ĉar la realeco plenumis tion, kion antaŭsento estis promesinta. Nigraj bukloj krispe ĉirkaŭis frunton kaj nukon, kaj kun la samkoloraj brovoj plimultigis la ĉarmon de la helblue bril-

antaj okuloj. Malgranda cikatro, kiel mallarĝa blanketa linio oblikve malsuprenirante kaj perdiĝante en la karmino de la supra lipo, tute ne malbeligis la buŝon, kies lipoj estis volupte pleniĝintaj kaj preskaŭ tro ruĝaj. Vangoj kaj mentono vidigis kavetaĵojn; frunto kaj nazo, kvankam eble ne laŭ la plaĉo de artistoj, sed tamen laŭ la gusto de miaj kunlandanoj, kompletigis la esprimon de la ĉarma kapeto kaj plej bele akordiĝis kun la formoj de samtempe gracia kaj plena korpo kies ĉarman belecon la mizera vestaĵo plimulte vidigis ol kaŝis. — Ĉu ne vere, pri tiaĵoj vi ne estas informita, Maltano? — Jes, vere, la maljuna monaĥo ree iom frenezas! — Ni trinku ankoraŭ unufoje! — Bone! Sufiĉas nun!

„La grafo estis absorbita de la vido de la knabino kaj apenaŭ rimarkis, ke en angulo de la ĉambro, kuŝante sur pajlaĵo, kun disŝirita selo kiel kapkuseno kaj kovrite per ĉifonoj, estis la mizera staturo de maljuna viro, kiu nun etendis la brakojn el siaj mizeraj kovriloj kaj per preskaŭ senzona voĉo demandis: „Ĉu

estas vi, Elga'? Kiun vi jen kondukis al mi?" — „Jen la malfeliĉulo,“ diris la knabino, turniĝinte al Starsenski', „por kiu mi, urĝita pro ekstrema mizero, petis vian kompaton. Li estas mia patro, nobelulo el malnova gento kaj nobelaro, forpelita per persekutoj ĝis tien ĉi!“ — Kun tio ĉi ŝi aliris la kuŝejon de la maljunulo kaj genuflekse klopodis konvenigi kaj ordigi la ĉifonojn, kiuj kovris lin.

„La grafo proksimigis sin kaj eksciĝis lian historion. Tiu, kiu kuŝis antaŭ li, estis la starosto Lašek'. Li kaj siaj du filoj estis partoprenintaj politikajn ligojn, kiujn la landanaro ne aprobis. Iliaj intencoj estis malkaŝataj kaj la du filoj kun kelke da sensingarduloj, kiuj estis kuniĝintaj kun ili, ekzilataj; la patro kies havaĵo estis konfiskita, estis en mizero.

„Unuamomente Starsenski, aŭdinte la nomon „Lašek'“, jam sciis, ke la situacio de la malfeliĉulo tute ne estis kaŭzita sen lia propra kulpo. Ĉar, kvankam oni ne povis pruvi lian senperan partoprenon al la agadoj de liaj filoj,

li tamen, pro facilanimeco dum sia junaĝo kaj malbona mastrumado dum sia maljunaĝo, estis malfaciliginta al siaj filoj la uzon de rajtaj rimedoj de prosperiĝo kaj tial ili emis pri riskaĵoj. Ĉion la grafo bone sciis. Sed la malfeliĉulo devis esti savata, kaj la patro de Elga' havis do la plej elokventan propetanton ĉe la grafo ravita pri lia filino.

„Oni translokigis Laŝekon en decan loĝejon kaj provizis lin kaj lian filinon per la necesajo. Starsenski uzis siajn influon kaj interrilatojn, li eĉ donis monon kaj donacojn por efiki la reindigon de la senindigito kaj la revokon de la ekzilitoj. Feliĉe, la eksteraj cirkonstancoj, pro kiuj estis danĝeraj la atencoj de tiuj sensingarduloj, estis de longtempe forgesitaj; pardono estis donata, kaj la ekzilitoj preparis revenon. Kelke da tiuj malfeliĉuloj, laŭ ilia facilanimeco, estis akceptintaj servojn en fremdlandoj; nur la filoj de Lašek' kaj malproksima parenco de la familio, nome Oginski', uzis la malfacile akiritan permeson. Ĉiutage oni atendis ilian alvenon.

„La redono de la konfiskitaj bienoj de Lašek' tamen kaŭzis nur malgrandan utilon. Ĉiutage prezentiĝis novaj kreditoroj. Kapitaj kaj restantaj procentoj multe superis la valoron de la ekzistantaj nemoveblaĵoj. Starsenski intervenis, pagis, ŝarĝis siajn proprajn bicenojn je ŝuldoj, sed tamen povis savi apenaŭ nur malgrandan reston de la posedaĵoj kiel inokulaĵon por estontaj tempoj.

„Pli feliĉa li dume ŝajnis esti koncerne siajn svatiĝoj pri la koro de Elga'. Kiam la knabino la unuan fojon revidis sin dece vestita, ŝi, ĉe lia eniro, ekkriante alkuris lin, kaj longtempe postsentita kiso de ŝiaj brulaj lipoj rekompenkis liajn antaŭzorgojn kaj penadojn. Verdire, tiu ĉi unua kiso provizore restis ankaŭ la lasta; sed tamen Starsenski povis esperi, ke li ne estas seninteresa por ŝia koro. Ŝi amis esti kune kun li kaj rimarkis kaj sentis lian foreston. Ofte li surprizis ŝin, kiam ŝi enpense kaj observante rigardis lin; eĉ kelkfoje li nur per rapida retiriĝo povis eviti kison sur sia mano, sed kiun li tre volonte estus akceptinta

sur siaj lipoj. Li estis plena da plej belaj esperoj. Sed subite la sceno aliĝis. Elga' nun estis malserena kaj meditanta. Antaŭe ŝi plej decide elparolis ŝian inklinon por distraĵoj, vestaĵa ornamo kaj vivĝuado kaj ofte eĉ tuŝis la limon de troeco; sed nun ŝi evitis societon, disputaj pensoj kvazaŭ kaŭzis nubojn sur ŝia bele glatigita frunto, la malklarigitaj okuloj rakontis pri larmoj, kaj ne malofte iu el tiuj ĉi embarasaj gastoj aperis sub la rapide malleviĝantaj palpebroj. Starsenski' rimarkis, ke tiakaze la patro rigardis ŝin serioze, preskaŭ minacante, kaj fiktiva gajeco pruvis la celadon de la knabino kaŝi sekretan ĉagrenon. Jufoje, rapide trairante la antaŭĉambbron por alpaŝi la pordon de la vizitoĉambro, Starsenski' ekaŭdis la voĉon de la patro, kiu ŝajnis esti plej forte kolera kaj eĉ uzis maldecajn esprimojn. La grafo malferminta la pordon ĉirkaŭrigardis kaj ne vidis trian personon sed nur la filinon, kiu tre ekscitite, kvankam ne plorante, kaj deturnite de l'patro, staris ĉe la fenestro. La insultaj vortoj do estis destinitaj por ŝi. La grafo

nun firme ekdecidis per rapida svatiĝo ĉesigi la turmentan necertecon de la interrilato.

„Dum li prokrastis mallongan tempon la plenumon de tiu ĉi decido kaj la antaŭa gajeco de Elga' iom post iom revenis, la parencoj, revokitaj el ekzilo, alvenis. Elga' ŝajnis pli malmulte ĝojigite pro la reveno de siaj fratoj ol la grafo estis supozinta. Sed plej frapanta estis ŝia rigida sensentemo, por ne diri: malsentemo, kiun ŝi vidigis kontraŭ la kunulo de la kulpo de ŝiaj fratoj, nome la bedaŭrinda kuzo Oginski', kiun ŝi apenaŭ indigis de unu rigardo. Bonstatura kaj havante bonan mienon, li ŝajnis neniel meriti tian malamon; kontraŭe, lia preskaŭ humila konduto pruvis la celadon akiri bonan opinion pri si de iu ajn; kvankam, kompreneble, li uzis ĉiun okazon por eviti la malŝatan traktadon de Elga'. Fine li tute malaperis, kaj neniu sciis, kien li estis irinta.

„Nun la grafo fine anoncis sian svatiĝon. La maljuna starosto ekploris pro ĝojo, Elga' ruĝigante pro honto kaj senparole falis en liaj

brakoj — la unuigito estis farita. Bruaj festoj anoncis la feliĉon de Starsenski' al la ĉefurbo, kaj diversaj multnombre vizitataj festoj certigis al li la ĝeneralan simpatian. Retenite ĉe la kortego per honora ofico, li baldaŭ lernis kutimi bruon kaj brilon, eĉ trovi plezuron en ili, almenaŭ tiom kiom Elga' trovis; ĉar ŝia emo por bruaj plezuroj pli kaj pli klare manifestiĝis. Ĉu do ŝi ne estis juna? Ĉu ne ĉiu plezuro devis ĉarmi ŝin duoble, nome kiel plezuro kaj kiel novaĵo post longdaŭraj malfeliĉaĵoj? La grafo permesis kaj estis feliĉa. Sed mankis nur unu io por tute feliĉigi lin, nome: jam unu tuta jaro estis pasinta de lia edziĝo, sed Elga' ne donis ankoraŭ esperon fariĝi patrino.

„Sed subite la trofeliĉo de la geedzoj estis intermitigata ankoraŭ pli senteble. La domadministristo de Starsenski, viro de pruvita fideleco, prezentis sin kun malserena mieno. Oni enŝlosiĝis, kalkulis, komparis, kaj baldaŭ vere klare vidiĝis, ke per tio kio estis farita por la parenkaro de Elga' kaj la senlima elspezado

dum lasta tempo, la estado de la grafa havaĵo estis malbonigata kaj postulis senprokrastan antaŭgardon. La fratoj de Elga' estis kaŭzintaj la plej grandan parton de tiu malboniĝo. Ĉar, efektive, malfeliĉo povas plibonigi nur plibonigeblajn homojn, la ĝuemo de la du facilanimuloj nur estis plimultiĝinta per la longdaŭra malhaveco. Devante pagi sian vivtenon per la mano de la grafo, ili estis plej senmezure uzintaj tiun permeson, kaj kiam la feliĉega grafo estis senpacience respondinta al la unuaj demandoj de siaj zorgemaj oficistoj, ke oni do ne tro precize kontrolu sed donu al liaj bofratoj tion, kiom ili bezonos, tiam postuloj kaj prenoj nur plimultiĝis.

„La grafo per unu rigardo prividinte la dubecon de sia situacio, ne sentis, laŭ sia ordemo, iom da maltrankviliĝo pro la neceso tuj foriĝi de la ĝisnuna senpripensa vivmaniero. Nur la penso pri Elga' timigis lin. Kun batanta koro li eniris la ĉambbron de Elga'. Kiel agrable do li estis surprizata per la konduto de sia edzino! Apenaŭ ke li estis klariginta la

cirkonstancojn kaj la neceson forlasi la urbon por rebonigi la facilanimecon de la laste pasinta tempo, Elga' ĵetis sin al lia brusto kaj diris ke ŝi estas preta kaj eĉ ĝojigita! Ke li volu, ke li ordonu — ŝi estos nur obeema! Kaj dirante tion, ŝi ekploris kaj volis ĵeti sin antaŭ siaj piedoj; sed li, ne permesante tion, levis ŝin al sia brusto por longdaŭra ĉirkaŭprenado dum kiu li forgesis tempon kaj eksteran mondon!

„Oni preparis ĉion por la forvojaĝo. Starŝenski', de juneco kutima de soleco kaj ĝuinte ĉiujn plezurojn de la kortego nur pro la ĝojo de sia edzino, preskaŭ benis la malfeliĉon, kiu devigis lin reiri al la kastelo de sia kampara hejmo. Elga' enpakis kaj prizorgis ĉion, kaj dum la unuaj horoj de varma Maja tago oni estis alveninta kun kestoj kaj pakoj la antikvan kastelon kiu, nove meblita kaj plej bone aranĝita, konkure anstataŭigis per najtingala kantado kaj flodoroj ĉion, kion dorlotita emo, kompare kun urbaj palacoj, eble povis senti kiel mankanta.

„Baldaŭ post la alveno, la kaŭzo de la facila konsento de Elga' pri la aliigo de la ĝis-nuna vivmaniero ŝajnis parte klariĝi; nome, estis la unuaj signoj de ŝia, ĝis nun de ŝi kaŝita, gravedo! Nun Starsĉnski', superversĉite de la plenumo de ĉiuj siaj deziroj, ne sciis limon de sia feliĉeco.

„Printempo kaj somero pasis dum kamparaj plezuroj, ordigaj aranĝoj kaj ĝojaj atendoj. Kiam foliaĵo defalis kaj muĝantaj ventegoj, la unuaj senditoj de vintro, ekskuis la fenestrojn de la kastelo, la sopirita kaj timita horo por Elga' proksimiĝis. Ŝi naskis, kaj anĝela bela malgranda knabino estis metata en la brakoj de la grafo, kiu benante ploris super la filino. Naskon kiel ankaŭ ĝiajn konsekvencojn facile travivinte, Elga' baldaŭ denove floradis kiel rozo.

„Tiom da favoraj okazoj estis bedaŭrinde intermitigataj per malagrablaj sciigoj el la ĉefurbo. La maljuna starosto, patro de Elga', estis mortinta, postlasante siajn cirkonstancojn

en plej granda senordo. La du bofratoj, jam ne subtenite, pro ilia freneza malŝparemo, per ilia pli antaŭpensema bofrato, plie kaj plie amasigis ŝuldojn, kaj la espero de iliaj kreditoroj kiuj estis atendintaj la postlasaĵon de ilia patro, estis parte trompitaĵ, ĉar la starosto estis testamente transdoninta grandan sumon al tiu bedaŭrinda Oginski', laŭ antaŭe farita formala donaco. Tiu ĉi kuzo, laŭ scio, estis malaperinta antaŭ sufiĉe longa tempo. Sed li tamen certe vivis kaj lia restejo ne estis nekonata de ĉiuj, ĉar la sumo destinita por li, estis postulata, akceptata, kaj kun tio la afero estis finita.

„Krom la malŝparoj de la du Laŝekoj ankaŭ famo diris, ke ili denove intencis malpermesitajn atencojn kaj fariĝis partianoj por novaĵoj malutilaj por la lando. Starsĉnski' plej urĝe estis petegata de siaj bofratoj kaj iliaj kreditoroj; sed ĉar li jam faris kion ajn li povis, li persiste rifuzis ĉiujn postulojn kaj havis la plezuron de la konsento de Elga' pri siaj opinioj. Eĉ, kiam la fratoj, kiel por lastfoja provo, alvenis la kastelon, ili estis akceptataj kun



riproĉoj de la fratino, kaj preskaŭ malamikeco rezultis de tio.

„Tiele pli ol du jaroj pasis, kaj nun la paco de la domo floris, post travivitaj ventegoj, des pli bele. Bedaŭrinde la grafo vane esperis ricevi viran infanon kiel heredon de lia nomo, sed des pli grandan kaj sendividan amon li havis por la kara sola infano.

„Ankaŭ oni povus apenaŭ imagi pli ĉarman infanon ol la malgranda rapide disvolviĝanta knabino. Kvankam ĉiaj eksteraj formoj de la infano montris la portreton de la patrino, rilate la koloroj de la gracia kapeto oni vidis strangan kapricon de kreinta naturo. Elga', kiel vi scias, ĉarmis per la nigreco de hararo kaj brovoj kaj per kontrastanta hela blueco de okuloj; sed tiu renverso de kutimo estis imitita ĉe la infano laŭ alia renverso, nome la kapeto de la knabino estis ĉirkaŭita per orflavaj bukloj, kaj sub longaj blondaj okulharoj sin kaŝis, kiel rabistoj antaŭ sunlumo, grandaj nigre rulantaj okuloj. La grafo ofte ŝercis pro

tiu kvazaŭ kappiede renversita simileco, kaj tiam Elga' pli intime premis la infanon al si kaj siajn lipojn sur la same ŝvelaj kaj same ruĝaj lipoj de l'infano.

„Ĉiujn horojn, krom tiuj, kiuj estis dediĉataj al la hejmaj plezuroj, la grafo dediĉis sole al la rebonigo de siaj havaĵaj cirkonstancoj malbonigitaj per la nepripensita donemeco kontraŭ la parencoj de Elga', kaj la plibonigo de siaj bienoj. Dum tagoj li trairis bienetojn kaj grenejojn, semkampojn kaj arbarajn de-hakejojn, ĉiam akompanite de sia administristo, maljuna honesta viro, kiu transdonite de patro al filo posedis lian tutan fidon. Jam de sufiĉe longa tempo la grafo rimarkis frapantan malserenecon de la mieno de tiu maljunulo. Senatendite turnante sin al li, li ofte surprize vidis liajn alitempe serenajn okulojn alrigardante lin preskaŭ larmeme. Sed la viro ne parolis.

„Iam do, kiam ili ambaŭ estis pasintaj varmegan antaŭtagmezon kun la rikoltistoj kaj nun, sidante en ombraĵo de alna foliaĵo, la grafo kun plaĉo ricevis trinkaĵon da akvo de sia

maljuna servisto, tiu ĉi eksplode komencis diri: „Kiel belege do vidiĝas beno de Dio sur la kampoj! Kiel feliĉe do devas senti la posedanto de ĉio!“ — „Kaj mi vere ja sentas tiele, kapjesige respondis la grafo, retrinkante. — „Oni ja povas kompreni“, daŭrigis parolon la maljunulo, „ke en urboj estas nekontentuloj, kiuj maltrankviligas ŝtaton kaj ordon kaj ne povas esti kontentigataj pri la regado; sed en kamparo, arbaro kaj herbejoj, oni do klare sentas, ke Dio sole regadas ĉion kaj Li ĉion faris bone ĝis tiu ĉi momento. Sed la rebeloj ne volas esti kontentaj antaŭ ol ĉio estos konfuzita kaj ruinigita, patro kaj frato forlogitaj kiel ankaŭ fratino kaj bofrato. Ke Dio pereigu ilin!“ — La grafo ekstariĝis. „Mi bone sentas, ke vi celas la fratojn de mia edzino,“ li diris. „Ĉu eble vi aŭdis diri ion pri ili?“ — Nun la maljuna viro subite defalis ĉe la piedoj de Starŝenski' kaj ekploregante ekkriis: „Sinjoro, ne lasu vin esti forlogata! Pensu edzinon kaj infanon!“ — „Kion vi do imagas?“ kolere respondis la grafo. — „Sinjoro“, ekkriis la

maljunulo, „viaj bofratoj intencas malbonon, kaj vi scias ilian intencon!“ — „Ĉu vi estas freneza?“ ekkriis la grafo. — Mi scias kion mi diras“, respondis la maljunulo. „Konfidulo de viaj bofratoj sekrete vizitas vin en la kastelo; sekrete oni lasas eniri lin; dum tagoj li estas en la duone ruinigita observa turo ĉe la okcidenta fino de la murego de la besteja ĝardeno.“ — „Kiu diris tion?“ — „Mi, ĉar mi mem vidis lin — sekrete alveni la kastelon!“ — „Kiam,“ — „Ofte“. — „Ĉu konfidulo de miaj bofratoj?“ — „En Varŝava' mi vidis lin ĉe via flanko!“ — „Ĉu vi scias lian nomon?“ — „Vi bone scias, ke mi estis en Varŝava' nur unufoje; mi do havis tie pli gravajn aferojn por servi vin, ol informi min pri la nomoj de la multenombraj trinkkolegoj de viaj bofratoj. Sed mi estas certa ke mi vidis lin.“ — „Dum kiuj horoj vi vidis, ke li alvenas la kastelon?“ — „Nokte!“ — Senvole Starŝenski' ektremis pro tiu ĉi respondo; sed tamen mallonga pripenso prezentis al li tiom da verŝajnaj klarigoj de tuj dumnoktaj vizitoj ke li jam estis preskaŭ Grillparzer, La Monaĥejo ĉe Sendomir'. 3

tute retranskribita ĉe sia reveno hejmen. Nur kvazaŭ okaze li demandis Elga-on, ĉu ŝi jam de longtempe ne estas ricevinta sciigojn de siaj fratoj, kaj ŝi tute senembarase respondis: „Neniam de ilia lasta alesto tie ĉi!“ La grafo ordonis ke la dommastro kies patriotajn dubojn li facile rifutis, nepre silentu pri la tuta afero; sed tamen li decidis plejeble ekzameni ĝin.

„Post kelke da tempo li iufoje dum posttagmezo estis forrajdinta por viziti unu el siaj malproksimaj posedaĵoj. Jam li estis rajdinta longan parton da vojo, kaj jam komencis vesperiĝo, kiam subite li aŭdis, ke oni laŭte kaj maltrankvile kriis lian nomon post li. Turniate sin li ekkonis la maljunan administriston, kiu rajdante sur pellacigita ĉevalo senspire klopodis atingi kaj ekhaltigi lin per vokoj kaj mansignoj. La grafo altiris bridon kaj ekhaltis. Oni ree estis vidinta la kaŭzinton de liaj zorgoj, nome la enigman nekonatulon. La grafo returnis ĉevalon kaj ambaŭ ili galope rerajdis sur sama vojo hejmen pene sekvite de la servistaro. Sufiĉe malproksime de la kastelo ambaŭ ili deiris de ĉe-

valoj kaj transdonis tiujn ĉi al la servistoj, kiuj atendu ilin ĉe signita loko. Tra dornarbeto kaj densaĵo ili aliris tiun observan turon, kie la fremdulo, laŭ diro, plej ofte vidiĝis. Sed dume noktiĝis kaj la luno ankoraŭ prokrastis leviĝon, kvankam krepuska helo ĉe la limo de la horizonto anoncis ĝin. Subite trafis iliajn okulojn lumradio tra branĉaĵo de tiu direkto, kie estis la observa turo. Rapidiĝinte atingi la limon de la arbaro, ili nun estis alvenintaj la piedon de la senarba monteto, sur kiu estis la observa turo. Sed neniam lumo brilis tra la difektitaj pafbreĉoj nek iuj postsignoj de homestaĵo estis videblaj! Verdire do, la administristo certigis rimarki, ĉe la lumo de la ĵus leviĝanta luno, freŝajn piedsignojn sur tero, kaj ankaŭ ili miris, ke la pordo ne estis ŝlosita; sed eble la unuaj signoj estis trompaj kaj la alia facile klarigebla per malatento de la kastelmastro.

„Plitranskribite la grafo kun sia akompananto deiris la monteton al la kastelo. La luno disvastigis sian arĝentan lumon sur la

kviete dormanta kamparo kaj prezentis la kastelon kiel feina palaco. Al la animo de la grafo ekaperis, pli ĉarma ol iam, la portreto de sia edzino. Nun li ankaŭ konfesis al si mem ke parto de la suspekto kiu estiĝis en li, estis pri ŝi, kaj nun sentante sian malrajton li imagis ŝin kuŝanta kun senzorga dormeto en virgulina lito, kaj tia sopirado okupis lin, kian li eĉ ne estis sentinta dum la unuaj tagoj de sia svatiĝo.

„Tiel revante li iris antaŭen. Subite li ek-sentis ke oni puŝis lin. Estis lia akompananto, kiu per fingro montris antaŭ si la hele lumigitan kampon. Starŝenski sekvante la direkton ek-vidis viran staturon, kiu turnante kontraŭ li la nelumigitan flankon de sia korpo, sekrete alproksimiĝis tra la kampo la kastelon. La grafo perdante memregadon kaj forkurante kun lautvoĉa ekkrio volis ataki la homon per etendita glavo, sed la fremdulo, frutempe aver-tite, forkuris de la kastelo kontraŭ la arboj. Jam la grafo volis persekuti lin tien, sed estis retenata pro dua aperaĵo, kiu ŝoviĝis antaŭen

laŭlonge la murego de la kastelo. Tiun aperaĵon oni baldaŭ ektrafis kaj ekkonis ĝin kiel trem-anta kaj timema Dortka', ĉambristino de la grafino. La unuan demandon pri tio, kion ŝi intencis tie ĉi? ŝi respondis per balbutitaj neinterligitaj senkulpigoj; la dua demando pri la vojo sur kiu ŝi estis alveninta, estis anstataŭante respondata per la malfermita elira pordeto kiu, kutime ŝlosita kaj riglita, povis esti malfermata nur laŭ ordono de la grafo per ŝlosilo, kiun li mem konservis.

„Ĉiuj provoj devigi la knabinon fari kon-feson, estis vantaj. Nun la grafo, ekstreme koleriĝinte, ekprenis ŝin ĉe mano kaj perforte kondukis ŝin tra la koridoroj al la ĉambroj de sia edzino, kiuj estis ankoraŭ lumigitaj kaj neŝlositaj. Elga' mem estis ankoraŭ maldorma kaj vestita. La grafo, balbutante pro furiozeco, rakontis la okazon kaj postulis, ke la knabino aŭ momente konfesu aŭ tuj estu forpelata el servo kaj domo. Dortka' genufleksita tremis kaj ploris.

„Starŝenski' estis supozinta ke ŝia edzino estos aŭ embarasita aŭ konsentanta lian justan koleron. Sed ne estis la unua nek la alia. Malsenteme kaj seninterese ŝi unue petis, ke li ne intermitigu la silentadon de la domo per sia laŭtvoĉa insultado, kaj kiam li daŭrigis postulante la forpelon de la knabino, ŝi kun plimultiĝanta energio diris, ke estas ŝia afero juĝi la konduton de sia servistino, kaj ŝi mem esploros kaj decidos. La grafo, ekstreme furioza, ektiris la knabinon de planko por perforte forigi ŝin el la ĉambro; sed Elga', brulruĝa pro kolero, alsaltis, ekprenis la alian manon de la knabino kaj ekkriis: „Antaŭen! Forpelu ankaŭ min el la domo! Tio do estas via fundamenta intenco! Ke mi do estu ekkoninta vin tiel kiel nun! Malfeliĉa mi, ofendita, maltraktata!“ ŝi ploregante daŭrigis; „sed senkulpaj servistoj ne suferu pro mi!“ Kun tio ŝi montris per fingro la pordon de sia dormoĉambro al la knabino; tiu ĉi komprenis la senparolan ordonon kaj rapide eniris. Elga' sekvis ŝin kaj ŝlosis la pordon post si.

„Starŝenski' staris kiel frapite de fulmo. Subite li, ekskuante sin, alkuris la ĉambron de sia edzino; sed duonvoje li ekhaltis kaj denove meditadis. La maljuna administristo alpaŝis lin kaj diris al li kelke da vortoj; sed la grafo sen respondo preteriris lin kaj forirante tra pordo kaj koridoroj al sia ĉambro, kiu estis en la kontraŭa flankajo de la kastelo, li sur sojlo turnis sin kaj per manmovo rifuzis ĉiun akompananton. Li fermis la pordon post si. Kia maniere li pasigis la nokton — kiu scias? La servisto kiu la alian matenon eniris lian ĉambron, vidis lin vestite sidanta sur sofo. Li ŝajne dormis, sed tamen liaj okuloj estis malfermitaj kaj fikse rigardis antaŭen. La servisto devis diversfoje nomi lian nomon antaŭ ol li moviĝis. Tiam fine la servisto anoncis la peton de la grafino, ke la matenmanĝo estu en ŝia ĉambro. Starŝenski' miregante rigardis lin, sed tiam stariĝis kaj silente sekvis lian kondukon.

„Gaje kaj florante, kvazaŭ nenio estus okazinta, Elga' ricevis lin; duone ŝercante ŝi citis la okazajn de la pasinta nokto. Ŝi kulpigis

la ĉambristinon pro sekreta amaĵo kaj alvokis ŝin mem. Dortka' sufiĉe mallerte rakontinte duban fabelon, fine petis pardonon, kiun la grafino donis, konsidere ŝia kroma konduto, por si mem kaj la grafo. Tiu ĉi, fine tamen ankaŭ demandite pri sia konsento, donis tiun ĉi per kapbalanco, kaj la knabino restis en domo.

„Silentante Starsĉenski matenmanĝis kaj mute li foriris el la kastelo. La maljuna administristo, duonvoje renkontinte lin, akompanis lin paŝante apud li sed ne riskante paroli; li nur serĉis eltrovi el la konfuzita mieno de sia estro respondon al siaj retenitaj duboj kaj demandoj. Tiamaniere ili paŝis antaŭen kaj plenumis siajn aferojn laŭ kutimo. La grafo ne nur klopodis ne pensi ion pri la okazoj de la hieraŭa tago, sed ankaŭ efektive ne pensis ion. Kiel la struto kaŝas kapon en arbeto, kredante ke nevido de danĝero estas same neekzisto de ĝi, tiel ankaŭ agas homo: li senvole fermas okulojn antaŭ proksimiganta neevite-

blaĵo, kaj ĉiu koro havas sekretojn, kiujn ĝi interne kaŝas antaŭ si mem.

„Post kelke da tagoj Starsĉenski' volis eniri la ĉambron de sia edzino. Oni diris ke ŝi estas en bano; sed aŭdante la voĉon de sia infano el apuda ĉambro, li eniris. Jen li trafis la malgrandulinon sidanta sur planko, meze granda konfuzaĵo, kiun ŝi estis farinta. Ornamaĵoj kaj juveloj de Elga' estis dissemitaj ĉirkaŭ la infano, kaj la malfermita reaversita juvelujo kunne kun la detirita tapiŝo de la apuda tualeto klare montris kiamaniere ĝi estis haviginta al si la multeprezan ludaĵon. Starsĉenski' bonanime insultante alpaŝis, dispute reprenis de la infano pecon post pecon de ĝia rabaĵo, kaj nun provis remeti la brilantajn ŝtonojn al iliaj lokoj. La kovrilo de la juvelujo ŝajnis esti duobla; ĝi estis disiĝinta pro la defalo de la tablo, kaj kiam li klopodis rekuneigi la partojn per premado, la interna parto de la duobla kovrilo defalis plankon, kaj nun, en la restinta kava spaco vidiĝis portreto. Ĝi estis nur mal-

bone fiksita, tial senpene forprenebla, kaj la grafo tenis ĝin en tremanta mano.

„Estis tiu la portreto de viro vestita per pola nacia kostumo. La sento de teruriga simileco superis lin kiel atakanto. Jen la ofte priparolita natura kaprico, nome nigraj okuloj kaj blondaj haroj — kiel ĉe lia infano! — Li rigardis la knabinon, tiam ree la portreton. — Li jam iufoje vidis tiun ĉi mienon, sed kiam? kaj kie? — Ektremo kaptis lin. — Li ree rigardis. Jen lia infano rigardante lin per nigraj laŭserpentaj okuloj, kaj la blondaj haroj kvazaŭ flamis kiel fajro, kaj la memoro de la rifuzita kuzo en Varŝava' terurege ekvekiĝis en li. — „Oginski'!“ li ekkriis, tenante sin ĉe tablo, kaj liaj dentoj grince kraketis unuj sur aliaj.

„Bruo en la apuda ĉambro ektimigis lin. Fiksinte la kovrilon ĉe ĝia loko; li fermis la juvelujon. Li enmetis la portreton en sian veston sur brusto, kaj forkuris kiel mortiginto.

„Dum tiu ĉi tago li ne estis plu videbla en

la kastelo. Lia seĝo ĉe tagmanĝa tablo restis neuzata. Ĉirkaŭ vespere li eniris la ĉambrom de la vartistino kaj postulis la infanon. Prenante ĉi tiun ĉe mano, li forkondukis ĝin en ĝardenon, alirante la dezertan muskan kabanon. Tie, post unu horo, la administristo trovis lin apogita dorsen en ripoza benko. „La infano staris inter liaj genuoj, li mem tenis portreton en mano, alterne rigardante tiun ĉi portreton kaj la infanon — kiel iu, kiu komparas“ — diris la maljunulo.

„La morgaŭan matenon Starsĉenski' estis forvojaĝinta — neniu sciis, kien? — Li estis en Varŝava'; tie li — tro malfrue — esploris pri la antaŭaj cirkonstancoj de Elga'. Li eksciis ke ŝi kaj Oginski', kiu estis edukata en la domo de la starosto, jam frutempe estis amintaj unu la alian kaj, pro timo pri la plimultiĝanta intimeco, oni estis foriginta la kuzon; post lia reveno de ekzilo — mallongan tempon antaŭ la edziĝo de Starsĉenski' — li estis renoviginta siajn pretendojn, kaj tiu granda sumo da mono, kiu estis aljuĝata al li

per la testamento de maljuna Lašek', estis parte la prezo de lia rezigno. Elga' nur nevolonte foriris de li; kaj lia malriĉeco kaj la riĉeco de Staršenski' kune kun la urĝado de ŝiaj parencoj, estis la ĉefa kaŭzo de ŝia konsento pri la unuiĝo kun la grafo. Ĉiujn tiujn cirkonstancojn, oni diras, unu el la fratoj de Elga' estis perfidinta al Staršenski' por mono, ĉar tiu ĉi ĝustatempe estis pruvinta donacema kontraŭ li; kaj tiu frato ankaŭ diris al li la lokon, kie Oginski', laŭ farita ĵuro, konservis sin kaŝita.

„Dume estis granda maltrankvilo kaj zorgo en la kastelo. Elga' mem, cetere, evidente estis la plej trankvila el ĉiuj. Ŝi ŝajnis ankoraŭ aljuĝi la strangan konduton de la grafo al tiu dumnokta surprizo, pri kiu la grafo, laŭ ŝia espero, fine mem trankviliĝos, ĉar oni ne povis certe kulpigi iun personon. Tiu ĉambristino estis daŭre en ŝia servado.

„Post kelke da tempo la grafo senatendite aperis ĉe la limo de sia bieno, kaj sekvis lin

fermita kaleŝo, kies enhavon neniu iel sciis. Envolvita staturo, eble per ŝtopilo malhelpita paroli, estis ellevata el ĝi kaj transdonata al la administristo, kiun la grafo estis antaŭe mendinta al la limo per letero. La antikva observa turo, de nun zorgeme ŝlosita, akceptis la strangan aperaĵon en ĝia gardo, kaj misteraj famoj disvastiĝis inter la loĝantaro de la ĉirkaŭaĵo.

„La grafo aliris sian kastelon. Kun laŭta ĝojego Elga' venis al lia renkonto, kun la infano ĉe mano. Li eksciis, ke oni estis tre maltrankvila pri lia subita forvojaĝo kaj plej sopire atendis lin. La tempo de vespermanĝo alveninte, Staršenski' diris, ke li estas malbonfarta kaj lacigita per la vojaĝo, kaj, spite ĉiuj kontraŭadmonoj, sola reiris sian ĉambron, kie li enŝlosis sin. Tamen lia bezono de ripozo estis nur fiktiva; ĉar dum nokto li forlasis sian ĉambron kaj sola aliris la observan turon, kie li restadis ĝis mateniĝo.

„La sekvantan matenon Elga' estis ĉagrena



kaj kolèreta. Lia dumnokta iro ne estis nerimarkita; Elga' sentis malatentite kaj montris malkontenton pri tio. Starŝenski' intermitigis ŝiajn koncernajn parolojn per parolo pri iliaj ambaŭflankaj cirkonstancoj. Li diris, ke dum sia nuna restado en Varŝava' kaj ĉe la denova vido de la plezurajoj de tiu ĝuema urbo, li konvinkigis ke tia ĉarma vivema estaĵo kia Elga', tute ne estas en sia deca loko, estante en kamparo. Li demandis, ĉu ŝi preferus la restadon en la ĉefurbo? — „Kun vi, jes!“ ŝi respondis. — La grafo plue diris ke li estas retenata en kamparo per siaj aferoj; siaj cirkonstancoj estas pli malbonaj ol oni kredas; li devas restadi tie ĉi. — Elga' respondis lin, ke tiukaze ŝi restados ankaŭ; ŝi volas vivi kaj morti kun li. Nun ŝi malbenis la du fratojn, kiuj per siaj senhontaj postuloj estas kaŭzintaj tiom da embarasoj al ŝia tro bonanima edzo. Ŝi plue certigis ke ŝi nun vere forigis de ŝi ĉiun reston de amo por ili. Se ŝiaj fratoj estus almozetantaj antaŭ ŝia pordo, ŝi ne malfermus ĝin, ŝi diris. La grafo parte defendis siajn bofratojn, kun kiuj li estis

parolinta en Varŝava'. Kun ili estis unu el iliaj kunekzilitoj. „Kiu do estas lia nomo?“ — Elga' same pripensis. — „Oginski'!“ ekkriis la grafo kaj rapide rigardis ŝin. Ne aliigante mienon ŝi diris: „La kunuloj de miaj fratoj estas ĉiuj malbonaj, sed tiu ĉi estas la plej malbona!“ — „Kiu?“ — „Tiu kiun vi nomis!“ — „Kiu estas tiu?“ — „Nu, Oginski'!“ ŝi respondis, kaj malforta ekstremo de ŝia mieno pruvis preterirantan emocion.

„La grafo alpaŝis fenestron kaj rigardis eksteren. Elga' sekvis lin kaj metis manon sur lian ŝultron. La grafo restis senmoviĝa. „Starŝenski'“, ŝi diris; „mi rimarkas monstran aliĝon de via esteco. Vi ne amas min tiel kiel antaŭe; vi kaŝas tion kaj tion antaŭ mi!“ — La grafo returnis sin. „Bone! Ni parolu, ĉar vi postulas parolon. Monstraj malfeliĉoj frapis min; vi scias la konfuzon de miaj cirkonstancoj kaj ĝian kaŭzon. Tion kio krome premas min, mi sole scias. Kvankam tiuj okazoj multe premas min, tamen ne pli malmulte turmentas min la penso, ke eble mi mem estigis la kaŭzon.“

Certe do la facilanimeco, kun kiu mi administris la heredaĵojn de miaj prapatroj, estas mallaŭdebla; eble mi eĉ estis puninda tiam, kiam mi, obstinulo kutima je malsocieteco, svatiĝis viveman gajan knabinon, ne atentinte la direkton de ŝiaj emoj kaj sentoj, nepripense ke ŝi, fariĝonte mia edzino, estos damnata al vivmaniero kies monotoneco devis esti netolerebla por ŝi!“ — „Starŝenski!“ diris Elga', rigardante lin kun flata riproĉo. „Oni proponis al mi fremdajn servojn,“ li daŭrigis, „kaj, bonpripense, foriri por sufiĉe longa tempo de la lando de miaj prapatroj, estas eble plej bona por mi. Ankoraŭ hieraŭ miaj decidoj estis multe pli malserenaj; sed la meditado dum tiu ĉi nokto konvinkigis min, ke tiu decido estas la plej bona.“ — „Ĉu dum tiu ĉi nokto vi meditadis?“ Elga' malkonfide respondis. „Kaj kie? Ĉu eble en tiu observatorio?“ — Kaj, ĉar Starŝenski' rapide returnis sin, „ĉu mi divenis vin?“ ŝi daŭrigis. „De tie do vi prenas viajn decidojn? De tie venas via deziro vojaĝi? Kaj tie eble ankaŭ estas la kun-

vojaĝontino? Famo sciigis min ke envolvita staturo, eble pli feliĉa amatino, estis tie levata el kaleŝo; kaj al tiu ĉi vi nun portas ĉiunokte la karesecon, kiun vi ĵuris al mi ĉe altaro? Ĉu tio estas mia rekompenco? — Venu!“ ŝi diris al la apude staranta infano, „venu! Ni ĝenas lin, ĉar li koniĝis aliajn plezurojn ol tiuj de la familia rondo!“ Kun tio ŝi turnis ŝin por foriri. Sonanta ekridego, pri kiu li mem ek-tremiĝis, kvazaŭ ĝi estus deveninta de alia persono, sonis el la buŝo de la grafo. Elga' returnis sin. „Mi bone scias, ke estas nur ŝereco; sed tamen vi faru al mi la malkaŝon de la sekreto de la observatorio! Mi mem vidu tion kion ĝi kaŝas! Ĉu vi promesas tion al mi?“ — La grafo, defalinte sur kuŝejon, kaŝis vizaĝon en ambaŭ manoj. Nun ekaŭdante, ke pordo malfermiĝis, li, rigardante tra la fingroj, vidis la ĉambristinon de sia edzino, kiu ĵus volis eniri kun ŝia nokta tolaĵo, kaj Elga-on, kiu kun ruza mieno faris al ŝi signon, ke ŝi foriru. Tiam Elga' proksimiĝis la kuŝejon kaj sidiĝante apud sia edzo, diris: „Venu, Star-Grillparzer, La Monaĥejo ĉe Sendomir'.“ 4

ŝenski', ni repaciĝu! Ni do de longa tempo ne interparolis sen atestantoj!“ Kun tio ŝi metis sian vangon al lia kaj tiris unu el liaj manoj al ŝia batanta koro. Ektremo kaptis la grafon. Li nur vidis nigraĵon de infero antaŭ si, kaj forpuŝante de si sian edzinon li forkuris.

Horloĝo estis batinta noktmezon. Silento estis ĉie en la kastelo. Elga' dormis en sia ĉambro. Subite ŝi sentis, ke oni ektuŝas ŝin, kaj rapide ekleviĝante el dormo ŝi vidis, je la lumo de la nokta lampo, sian edzon kiu, tenante lanterneton en mano, diris ke ŝi ekstariĝu kaj sekvu lin. Ŝi demandis, kial? kaj li respondis, ĉar ŝi esprimis la deziron koniĝi la sekretojn de la observa turo; sed tio ne estante farebla dum tago, ŝi sekvu lin, supozite ke ŝi ne timas mallumon nek noktan aeron. „Sed — ĉu vi ne intencas malbonon?“ la grafino demandis; „vi hieraŭ vespere kondukis tiel strange!“ — „Se vi ne volas sekvi, restu!“ diris Starsenski' kaj volis foriri. „Haltu!“ ekkriis Elga'. „Se timo estas komuna heredaĵo de virinoj, mi ne estas virino. Ankaŭ tiu ĉi estado de necerteco

devas ĉesi! Eble vi rekonsciiĝis kaj konfesas!“ — „Se vi volas esti konvinkata“, diris Starsenski', „ekstariĝu kaj sekvu min!“ Elga' eksaltis el lito kaj envolvis sin per dormpelto. Ŝi volis foriri kun li. Sed dume la infano, kiu dormis apud ŝi en lito, estis ekvekiĝinta kaj komencis plori. „Via infano vekos la loĝantojn de la kastelo“, diris la grafo. Senparole Elga' suprenprenis la infanon, envolvis ĝin per varme kovranta tuko, kaj kun la infano sur brako ŝi sekvis la kondukantan edzon.

„La nokto estis malvarmeta kaj malluma. Kvankam steloj miloble briletis ĉe funebre malluma ĉielo, tamen la luno ne akompanis la solecan vojon de la migrantoj; nur la lanterneto de la grafo lumigis la fundon kaj la plej malsuprajn foliojn de la noktmeze dormantaj arbetoj per mallongaj lumstrioj.

„Tiumaniere ili estis trapaŝintaj la bestejan ĝardenon — tiel nomata pro ĝia antaŭa destino — kaj nun estis alvenintaj la observan turon, kiu estis la celo de ilia migrado. Nun la grafo

returnis sin al sia edzino kaj diris: „Vi nun estas esploronta la plej kaŝitan sekreton de via edzo. Vi volas surprizi lin ĉe la rompo de lia edzeca fidelo kaj hontigi lin antaŭ lia kondamninda amatino. Justeco postulas, ke danĝero kaj utilo estu samaj ĉe ambaŭ partoj. Antaŭ la eniro vi ĵuru, ke vi mem neniam kulpigis vin per la sama krimo, ke vi estas pura koncerne la krimo pro kiu vi kulpigas vian edzon!“ — „Vi serĉas elturniĝojn!“ diris Elga'. „Edzino!“ daŭrigis la grafo, „pense ekzameni vian pasintan vivon, kaj se vi trovos en ĝi ian difekton — mi ne volas diri brulvundon! — tiam ne eniru tiun ĉi muregon!“ Elga' premŝovis sin preter la grafo kontraŭ la enirejo. Li denove stariĝis antaŭ ŝi, ekkriante: „Vi ne eniros antaŭ via ĵura certigo! Metu manon sur la kapo de via infano kaj ĵuru!“ — Nun Elga' metis la dekstran manon sur la kapo de la dormanta infano kaj diris: „Kvankam sen-necesa ŝajnas al mi tia ĵuro kaj vi mem estas konvinkata pri tio, mi tamen certigas —.“ — „Ekhaltu!“ kriis Starŝenski, „tio sufiĉas!“

„La grafo malfermis. Ili supreniris mal-larĝan tordan ŝtuparon, kiu ĉesis ĉe pordo, kiu ankaŭ estis ŝlosita. Ankaŭ malfermite tiun ĉi, ili eniris grandspacan ĉambron, kies plej posta parto estis apartigita per malhela kurteno. La grafo metis seĝojn al alŝovita tablo, ekbruligis, per la lumo de sia lanterneto du vaksandelojn en pezaj metalaj kandeligoj, tiris el la tirkesto de la tablo kajeron kun paperoj kaj faris signon al sia edzino ke ŝi sidiĝu, dum li ankaŭ sidiĝis. Elga' ĉirkaŭrigardis, sed ne rimarkis iun personon. Ŝi sidadis aŭskultante.

„Nun la grafo, alŝovinte sin al lumo, komencis legi el la paperoj, kiujn li tenis, jenon: „„Ankaŭ mi konfesas ke mi havis malpermesitan interrilaton kun la filino de la starosto Lašek' antaŭ kaj post ŝia edziniĝo kun la grafo Starŝenski'. La unuobla infano de ŝia edzineco —““ „Ne aŭdita kalumnio!“ ekkriis Elga' ekstariĝante. „Kiu kuraĝis kulpigi min pro tiaj faroj?“ — „Oginski!“ diris la grafo, „ekstariĝu por certigi viajn konfesojn!“ Kun

tiu parolo li fortiris la kurtenon, kaj jen vidigis vira staturo kuŝanta sur pajlaĵo kaj alkatenita ĉe muro. „Kiu vokas min?“ demandis la malliberulo. „Jen Elga“, diris la grafo, „demandante ĉu estas vera ke vi estas karesinta ŝin?“ — „Kiomfoje mi tion devas ripeti?“ diris la viro returninte sin en siaj katenoj. „Mi ĝuis ŝin!“ — „Ĉu vi aŭdis?“ ekkriis la grafo kontraŭ sia edzino, kiu staris palvizaĝa kaj rigida. „Jen la ŝlosilo; malfermu la katenojn de tiu ĉi viro!“ Ĉar Elga' prokrastis, la grafo duone eltiris sian glavon — ŝi iris. Tintante defalis la ĉenoj, kaj Oginski' paŝis antaŭen. „Kion vi postulas de mi?“ li diris. — „Vi plej intime ofendis min. Vi scias kiamaniere viroj kaj nobeluloj intertraktas iliajn ofendojn. Jen prenu tiun ĉi sabron“, li daŭrigis, eltirante alian sabron el sia surtuto, „kaj starigu vin kontraŭ mi!“ — „Mi ne volas skermi!“ respondis Oginski'. — „Vi devos!“ ekkriis Starsenski kaj atakis lin. Dume oni aŭdis bruon sur la ŝtuparo. Elga' kiu estis starinta senmove, alkuris la pordon kaj provis

malfermi ĝin, kriegante pro helpo. Starsenski' ekkaptis ŝin ĵus kiam ŝi prenis la anson, repuŝis la edzinon malantaŭen kaj ŝlosis la pordon. Oginski', uzante tiun ĉi intertempon, rapide malfermis la fenestron, dum la grafo estis ankoraŭ okupata ĉe la pordo, kaj desaltis mal-supren tra ĝi. La falo ne estis profunda; Oginski' sendifekte atingis teron, kaj forkurante liaj paŝoj jam alsonis de malproksime, kiam la grafo de la pordo atingis la fenestron.

„Li turnis sin al sia edzino. „Via kunulo forkuris“, li diris, „sed vi ne forkuros de mi!“ — „Ĉu vi do povas kredi tiun kalumnion?“ Elga' balbute diris. — „Mi kredas tion, kion mi scias“, respondis Starsenski', „kaj la sigelon de simileco en la vizaĝo de tiu ĉi infano! Vi mortu“, li diris, „kaj tuj en tiu ĉi loko!“ — Elga' genuflekse ekkriis: „Kompatu mian vivon! Decidu pri mi laŭ via volo, ekzilu, forpelu min, ordonu, ke mi pasigu mian restan vivon en monaĥinejo aŭ malliberejo — sed nur lasu al mi la vivon, vivon!“ — La grafo iome pripensinte, respondis: „Ĉar vi do tiom ŝatas

vian hontplenan, abomenan vivon, sciui ke ekzistas nur unu rimedo por via savo!“ — „Nomu ĝin, nomu!“ krietis Elga'. — „La brulvundo de mia honoro“, diris la grafo, „estas tiu ĉi infano. Kiam morto estos ferminta ĝiajn okulojn, tiam eble mia furiozo plitrankviliĝos. Ni estas solaj, neniu vidas nin, nokta mallumo kovros la faron. Antaŭen, mortigu la infanon!“ — „Kiel? Ĉu mi?“ ekkriis Elga'. „Ĉu mi mortigu mian infanon? Abomenulo, malhumanulo, kion vi postulas de mi?“ — „Nun do!“ ekkriis Starsĝenski' relevante la forĵetitan sabron. — „Ekhaltu!“ ekkriis Elga', „ekhaltu! Mi faros!“ Ĝi alkuris sian infanon, kisis ĝin, prenis ĝin al sia brusto kaj ploregis super ĝi. — „Ĉu vi prokrastas?“ ekkriis Starsĝenski' movante sin kontraŭ ŝi. — „Ne, ne!“ ekkriis Elga'. „Dio pardonu tion, kion mi devas fari nek povas eviti! Kaj vi pardonu min, bedaŭrinda malfeliĉe naskita infano!“ Kun tio, refoje premante la infanon al sia brusto, ŝi, deturnante okulojn, ekprenis grandan pinglon, kiu kuntenis sian pelton; la morti-

gilo ekbrilis, la armita brako. . . — „Ekhaltu!“ subite ekkriis Starsĝenski'. „Nur tion ĉi mi volis sperti, konvinkiĝi ĉu eble ankoraŭ estas en vi ia sento indas taglumon! Sed via interno estas nigra nokto! Via infano ne mortu, sed vi mem mortu, senhonta!“ kaj kun tio li puŝis la sabron en ŝian flankon tiel ke sango alten suprensprucis kaj Elga' falis sur la sendifektan infanon. —

„Tiu nokto estis teruriga por la loĝantoj de la ĉirkaŭaĵo. Pro teruro pri la fajra ruĝo de ĉielo, eklasinte domojn, ili alkuris kaj vidis, ke la antikva observa turo ĉe la okcidenta muro de la besteja ĝardeno de la kastelo de Starsĝenski' hele flamante bruladis. Ĉiuj klopodoj por estingi la fajron estis vanaj; baldaŭ nur nigraj muregoj staris inter bruligitaj fumigaj ruinoj. Oni volis ekveki la grafon sed ne trovis lin nek liajn edzinon kaj infanon. Oni traserĉis la brulejon kaj, verdire, trovis homajn ostojn; sed tiuj ĉi do ne povis esti la restaĵoj de tri homoj.

„Sed kiam tiu nokto finiĝis, malriĉa karbonista edzino en montaro fariĝis, laŭ ŝia opinio, la plej feliĉa virino el ĉiuj mortebuloj. Ekvekiĝinte kaj malfermante pordon ŝi vidis antaŭ si, ĉe lumo de mateniĝo, plorantan dujaran infanon, kiu anstataŭ ol esti vestita, estis envolvita per vasta tuko, kaj apud ŝi estis kesteto. Malferminte tiun ĉi, la virino trovis en ĝi plimulte da oro ol la malriĉaj geedzoj iam estis revinta vidi kune. Kelkaj aldonitaj skribitaj linioj rekomendis la infanon al la prizorgemo de la geedzoj kaj promesis pluajn mondonacojn dum estonta tempo.

„Post du tagoj la grafo ree aperis ĉe sia kastelano; sed nur por prepari vojaĝon Varŝava-on. Tien alveninte li petis kaj ricevis personan aŭdiencon ĉe la reĝo, kiu poste, vid-eble emociite alvenigis sian kancelieron kaj ordonis al tiu ĉi, ke oni skribu malfermitan leteron alskribante al la grafo, kiel la lasta de sia gento, liberan disponon pri siaj feŭdaj bienoj.

„La bienoj mem estis parte vendataj kaj la enspezo uzata por forigo de ŝuldoj, parte transdonataj kiel fondaĵo por la nova monaĥejo, kiun oni komencis konstrui proksime la loko, kie iam estis la bruligita antikva observa turo. — Jen la historio de tiu ĉi monaĥejo!“ Kun tio la monaĥo finis sian rakonton.

„Sed la grafo mem —“ diris unu el la fremduloj.

„Mi jam komence avertis vin, ke vi ne plue demandu, kiam mi estos fininta; sed nun vi tamen demandas!“ respondis la monaĥo. „Multenombraj mesoj por mortintoj estis fondataj por la anima ripozo de tiu virino, kiun rapidega perforta ago estis foriginta de la mondo meze ŝiaj pekoj, kaj por pardonigo de la malfeliĉulo, kiu per kondamninda trorapid-eco punis krimojn per krimo. La grafo estis fariĝinta monaĥo de la monaĥejo fondita de li. Komence li trovis konsolon en la silento de la monaĥeja vivado kaj la monotoneco de la pentaj ekzercadoj. Sed tempo, anstataŭ ol mala-

krigi la pikilon de lia konscienco, pli kaj pli terurige sentigis lian iaman faron al li. La agema spirito de lia gento reokupis lin, kaj la soleco de lia ĉelo fariĝis turmentego por li. Kiel frenezulo li do interparolis kun fantomoj kaj furiozis kontraŭ si mem dum kelke da jaroj. Fine resaniĝinte li dumtage ĉirkaŭvagadis; ĉar ĉiu faro estis por li refreŝilo, kaj li uzis sian forton kontraŭ la arboj de la arbaro. Nur nokte, je la horo, kiam tiu plendinda faro okazis, nome la unua horo post noktmezo, kiam komencas la funebra soleno“ . . . — Jen liaj paroloj subite estis intermitigataj per la unuaj sonoj de alsonanta ĥorkantado, kaj samtempe la horloĝo ekbatis la unuan horon.

Ĉe la unuaj sonoj la monaĥo ekstremitis. Liaj genuoj tremis, liaj dentoj kunfrapis, li ŝajnis defali — subite malfermiĝis la pordo kaj la abato de la monaĥejo rekte sintenante, kun la brilanta kruco de lia indo sur brusto, aperis sur la sojlo. „Kial vi prokrastas, Starŝenki?“ li ekkriis; „jen la horo de via pentofaro!“ Nun la monaĥo ekkrietis kaj, kurbite

kiel vundita besto, vastronde ĉirkaŭirante kiel hundo, kiu timas punon, li ŝovis sin al la pordo, kiun la abato paŝante flanken liberigis. Alveninte tien, li elkuregis kiel sago, kaj la abato sekvante lin, fermis la pordon post si.

Longan tempon, la fremduloj auskultis la ĥorkantadon, fine ĝi maleksonis tra la silento de la nokto, kaj tiam ili kuŝiĝis por mallonga ripozo.

La postan matenon ili diris adiaŭ al la abato, dankante lin pro la gastema regalo. La pli juna kuraĝiĝis demandi pri la monaĥo de la hieraŭa nokto; sed la abato senresponde deziris al ili feliĉan vojaĝon.

Ili forrajdis Varŝava-on kaj decidis plue informi sin pri la estado de la monaĥo ĉe ilia revojaĝo. Ili ja estis bone ekkonintaj lin kiel malfeliĉa Starŝenki'. Sed aliĝo de iliaj aferoj necesigis al ili alian revojon, kaj neniam plu ili sciiĝis ion pri la monaĥo nek la monaĥejo ĉe Sendomir'. —

Fino.



Jus aperis

Wilhelm Bölsche

Unu ĉapitro

el

La ama vivo  
en la naturo.

Ricevebla per la librovendistoj  
ĉiulandaj.

M 1.— = K 1.20 = Frs 1.35.

Sendkostoĵ je recta alsendo en Ger-  
manujo 10 pfenigoj, en Mondpoŝta  
unuiĝo 20 pfenigoj.

Franckh'sche Verlagshandlung, Stuttgart.

Bestell-Zettel.

Von der Buchhandlung von .....

(Verlag und Barsortiment für Esperanto-Literatur  
Franckh'sche Verlagshandlung, Stuttgart)

bestelle:

- ..... Bölsche, Ama vivo . . . . . M 1.—  
..... Heyse, Edziĝa festo en »Capri« . . M 1.—  
..... Fried, A. H., Lehrbuch der Weltsprache  
Esperanto (mit Wörterbuch) . nur M 1.25  
..... Jürgensen, Lehr- und Uebungsbuch der  
Weltsprache Esperanto . . nur M 1.25  
..... Zamenhof, Dr., Grosses Wörterbuch.  
Deutsch-esperanto . . . . . M 2.—  
..... Jürgensen, Grosses Wörterbuch.  
Esperanto-deutsch . . . . . M 2.—  
..... Ostwald, Prof., Dr. W., Die Weltsprache.  
Beste Propaganda-Broschüre . . . . M —10  
10 Stück 80 Pf. — 100 Stück M 8.—  
..... Franckh's Esperanto-Kuverte,  
als bestes Propagandamittel, jedem Esperantisten zum  
Gebrauch empfohlen. 50 St. nur 45 Pf. 100 St. 80 Pf.  
Franckh's Postkarten, ähnlich ausgestattet, 50 Stück 60 Pf.

Name und genaue Adresse: .....

# Scherr

Illustrierte Geschichte

der

## • • Weltliteratur. • •

10. Auflage, den Forderungen der Neuzeit entsprechend durchgesehen und bis zur Gegenwart ergänzt von Scherrs Stieffohn, Professor O. Haggenschmied in Zürich, mit mehreren 100 Portraits, Facsimiles, farbigen und schwarzen Tafeln, Beilagen etc. illustriert.

### Jubiläumsausgabe

Ein echtes deutsches Hausbuch, das in keiner Familie fehlen darf. Frisch und lebendig geschrieben bildet es eine anregende, fesselnde Lektüre und ist für jeden Literaturfreund und besonders für die studierende Jugend unentbehrlich.

Hochfein geb. M. 18.50 = 22 R. 20 H. ö. W.

Kann auch nach und nach in 21 Lieferungen à 80 Pf. = 96 H. ö. W. oder vollständig gebunden ohne Preiserhöhung gegen Monatsraten von M. 2.— = 2 Kr. 40 H. ö. W. bezogen werden.

Franckh'sche Verlagsbuchhandlung, Stuttgart.

Probehefte durch jede Buchhandlung.



espoteko  
№ 14229

Jus aperis

Wilhelm Bölsche

Unu ĉapitro

el

La ama vivo  
en la naturo.

Ricevebla per la librovendistoj  
ĉiulandaj.

M 1.— = K 1.20 = Frs 1.35.

Sendkostoj je recta alsendo en Ger-  
manujo 10 pfenigoj, en Mondpoŝta  
unuigo 20 pfenigoj.

Franckh'sche Verlagshandlung, Stuttgart.

Książnica Podlaska

im. Ł. Górnickiego w Białymstoku



KP-F14-0002619